
# REVUE SPIRITE

Journal d`Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC

ISK
INTERNACIA SPIRITISMA KONSILIO

# Dia Leĝo aŭ Natura

## Bono kaj Malbono


Selektitaj Artikoloj

Jaro 168 | N- 21 | 2025

Ĉi tiu volumo enhavas kelkajn artikolojn el la Revuo Spirite de la jaro 168, Oktobro 2025 numero 21. Ĉi tio ne estas kompleta versio. Tradukoj estas respondeco de la tradukinto.
.

**TRADUKISTOJ KAJ REVIZIISTOJ EN ĈI TIU NUMERO**

JOSÉ ROBERTO ALVES DE ALBUQUERQUE
PAŬLO PIRES



**Revue Spirite**
**Journal d`Études Psychologiques**
**Fondée par ALLAN KARDEC le 1er janvier 1858**

Havaĵo de la Internacia Spiritisma Konsilio (CEI)
Logo et Marque Européenne enregistrée à l'EUIPO (Office de l'Union Européenne pour laproprieté intellectuelle)
® Komerca marko 018291313
Mark française déposée à l'INPI (Institut National de la Propriété Intellectuelle) sur le numéro
® 093686835.

**Redaktita de**
Federação Espírita Portuguesa
Praceta do Casal Cascais 4, r/c, Alto da Damaia, Lisboa
ISSN 2184-8068
Depósito Legal 403263/15
© copyright 2025
Jaro 168
Nº21
CSI | Kvaronjara | Oktobro 2025
Senpaga distribuo

**Direkto (ISK)**
Jussara Korngold

**Kunordigo (FEP)**
Vitor Mora Féria

**Redakcia kunordigo**
Sílvia Almeida

**Skribo kaj provlegado**
Cláudia Lucas
José Carlos Almeida

**Web**

Marcial Barros
Nuno Sequeira
Sandra Sequeira

**Arto & Dezajno**
Sara Barros

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com
www.cei-spiritistcouncil.com

# Indice


| | |
|---|---|
| JUSSARA KORNGOLD | ĈEFARTIKOLO |
| HUMBERTO SCHUBERT COELHO | FILOZOFIO KAJ SPIRITISMO |
| | PLEJ KOMUNAJ ERAROJ EN LA DISVASTIGADO DE SPIRITISMO |
| JUSSARA KORNGOLD | SPIRITISMO KAJ RELIGIO |
| | BONE KAJ MALBONE SUFERI |
| SPIRITO NATHANAEL | FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO, HODIAU |
| | VI REVIDOS |
| JUSSARA KORNGOLD | DIVALDO |
| MÁRIO FRIGÉRI | SPIRITISMO KAJ RELIGIO |
| | LETERO AL SPIRITISMA MOVADO |
| REDAKTEJO DE SPIRITISMA MOMENTO | SPIRITA MOMENTO |
| | NE REZIGNI PRI LA BONO |

## ĈEFARTIKOLO



Jussara Korngold

**JUSSARA KORNGOLD**

### Pripenso kaj Spiritisma Respondeco

La 3-an de oktobro 1869 Allan Kardec revenis al la spirita mondo, lasante post si heredaĵon kiu daŭre lumigas generaciojn. Oktobro, do, ne estas nur monato de memoro; ĝi estas ankaŭ alvoko al la respondeco de ĉiu el ni por konservi kaj disvastigi liajn instruojn. Pli ol simple festi daton, ni estas invitataj pripensi la amplekson kaj profundon de la verko kiun li lasis al ni, kaj kiel ni, eĉ hodiaŭ, plu alportas la Spiritismon al tiuj kiuj serĉas komprenon, konsolon kaj leviĝon.

La heredaĵo de Kardec ne limiĝas al *La Libro de la Spiritoj*; ĝi ankaŭ inkluzivas *La Libro de la Mediumoj*, *La Evangelio laŭ Spiritismo*, *Ĉielo kaj Infero*, *La Genezo*, kaj multajn aliajn verkojn kiuj starigis solidan fundamenton por la studado de la spirita vivo. La *Revuo Spiritisma*, kiun li eldonis dum dek du jaroj, estis alia decida ilo, malfermante spacon por debatoj, esploroj kaj la disvastigo de ideoj kiuj daŭre iluminas konsciencojn. Tiuj klopodoj ne nur firmigis la Spiritismon en lia tempo, sed ankaŭ starigis la fundamentojn por ke ĝia mesaĝo restu viva, eĉ fronte al la komencaj rezistoj de la socio.

Hodiaŭ la Spiritisma Movado spegulas tiun heredaĵon kun matureco kaj diverseco. Centoj da centroj, studgrupoj kaj karitataj iniciatoj agas tra la tuta mondo, antaŭenigante scion, solidarecon kaj la integriĝon kun scienco kaj edukado. En multaj landoj ni vidas fortan kaj aktivan ĉeeston, montrante ke la Spiritismo restas aktuala — kapabla dialogi kun novaj tempoj sen perdi la esencon de la instruoj kodigitaj de Kardec.

La hodiaŭa defio estas konservi la kvaliton de la disvastigado, eviti troajn simpligojn kiuj malfortigus la profundon de la Doktrino, kaj certigi ke racio, logiko kaj kritika rigoro restu gvidprincipoj en la spiritisma studado kaj praktiko. Ĉiu prelego, ĉiu libro, ĉiu ago de karitato estas okazo honori la memoron de Kardec, konfirmante nian sindediĉon konstrui pli justan, pli klarigitan kaj pli fratan socion.

Oktobro, do, ne estas nur monato de memoro, sed ankaŭ invito al konscia agado. Ĝi estas la momento por reafirmi, ke la Spiritismo ne limiĝas al konservado de la pasinteco, sed renovigas sin en ĉiu ago de studado, pripenso kaj amo al la proksimulo, certigante ke la lumo de Allan Kardec plu gvidas la vojon de ĉiuj, kiuj serĉas kompreni la vivon en ĝia plej profunda dimensio.

## TEKSTO DE LA EKIPE N21

**Teksto de la Teamo**
Per ĉi tiu numero ni komencas la sesan jaron de publikigo de ĉi tiu nova serio de la *Revuo Spirita*. Kun ĝi, ni konsideras ke malfermiĝas nova ciklo, en kiu ni invitas niajn aŭtorojn direkti siajn alirojn kaj reflektadojn al la tuta aro de Moralaj Leĝoj, prezentitaj de la superaj Spiritoj al la Homaro en la fundamenta verko de Spiritismo, *La Libro de la Spiritoj*.

Ni komencas per la kadro de la temo, traktante la Dian aŭ Naturan Leĝon. Ĉi tiu leĝo regas, unuflanke, la materialan universon kun ĝiaj leĝoj, kies studado apartenas al la scienco, kaj, aliflanke, la moralan universon. Ĉi tiu, ja, konsistanta el moralaj leĝoj, rilatas speciale al la homo, al lia animo, al liaj rilatoj kun Dio kaj kun siaj similuloj. Ene de ili, ni lasas kelkajn notojn pri la bono kaj la malbono. Ni esperas, per organizado kaj kunigo de la studoj kaj reflektadoj ĉi tie prezentitaj, kontribui al la bono, "havante en vido la bonon kaj por la bono de ĉiuj[1]". Ni deziras ke ĝi estu utila!

**Teksto de la Kovrilo**
La kompreno de la malbono kiel nescio, morala malperfekto aŭ malproksimiĝo de la Dia Leĝo, eliminante la ideon de eterneco en la eraro.
La malbono estas nur transira etapo sur la vojo de la evoluo.
La vera bono konsistas en antaŭenigi la progreson.
La tempo de Dio havas precizajn mezurojn inter la Bono kaj la Malbono, kiujn la Spirito povas uzi en la desegno de sia ekzisto laŭmezure kiel ĝi evoluas.
Nia kovrila elekto reflektas la ideon de forlaso de la eraro kaj proksimiĝo al la Bono; de malproksimiĝo de la malperfekto ĝis atingo de stato de pureco.

**FRAZO**
«Ni komprenu, ke la bono estas la efektivigo de la Dia Leĝo, establante la feliĉon de aliaj kun la sama justeco, kun kiu ĝi establas ĝin por ĉiu el ni. Kaj la malbono estas la turmento, kiun, eble, ni trudante al la ekzisto de la proksimulo.»
— *XAVIER, F.C. Busca e acharás. (Emmanuel, Spirito)*

[1] KARDEC, A. La Libro de la Spiritoj — Demandoj 629–646

# FILOZOFIO KAJ SPIRITISMO
# PLEJ KOMUNAJ ERAROJ EN LA DISVASTIGADO DE SPIRITISMO


Humberto Schubert

**HUMBERTO SCHUBERT COELHO**

**BIO:**

Humberto Schubert Coelho estas profesoro pri filozofio ĉe Federacia Universitato de Ĵuiz-de-Foro, Brazilo. Li volontulas ĉe Spiritisma Societo Primtempo kaj Brazila Spiritisma Federacio.

**TRADUKISTO:**

Paŭlo Pires

**RESUMO:**

Sendube, la plej ofta kaj plej grava eraro post la mensogo estas la logika eraro, tio estas, la falacio. Falacioj estas mankoj de argumenta kohereco farataj de preskaŭ ĉiuj homoj. Ili estas do problemo, sed problemo kiu tuŝas ĉiujn diskursojn, tiel ke ne estus juste akuzi iun personon esti falacia; estas la argumento kiu estas malĝusta. Tamen, krom la nescio, la falacio ankaŭ montras problemon sur la limo inter moraleco kaj intelekto: la intelekta malhonesteco. Preskaŭ ĉiam neintence farata, intelekta malhonesteco devenas de manko de kritika edukado. En ĉi tiu teksto, mi montros kelkajn el la plej ofte uzataj falacioj, montrante kiel ili aperas en la spiritisma diskurso kaj kiun damaĝon ili povas kaŭzi al la publika percepto pri spiritismo.

**ŜLOSILVORTOJ:**

logiko, diskurso, disvastigo de spiritismo, falacioj.

La vero estas io serĉata per logiko, per la uzo de racio kaj per pacienca observado. Logiko estas la plej simpla parto de laboro por plibonigi ideojn, kaj ĝi povas esti facile formaligita. Kritika rezonado kaj observado de faktoj postulas, ĉiu aparte, specifan edukadon, malfacilan por resumi; sed logiko, estante la perfekteco de la formo, estas neduba.

En la studado pri la disvastigo de spiritismo, la faktoj kaj la kritika rezonado povas postuli pli grandajn klopodojn, sed la uzo de logiko devas esti antaŭkondiĉo, ĉar ĝia manko precize produktus la plej nedezirindan situacion: tiu de dekadenco en la kvalito kaj racieco de la spiritisma diskurso. Intelekta kaj diskursa dekadenco,

kiam ĝi okazas, rezultas en manko de konvinko ĉe junuloj kaj inter tiuj, al kiuj oni unuafoje prezentas spiritismon, ĉar la parolantoj, falante en oftajn kontraŭdirojn kaj subtenante malverojn, senvalidigas la instruadon mem.

Mi naskiĝis en medio, kie oni rimarkis malpliboniĝon de la spiritisma literaturo kaj diskurso, do mi neniam havis la impreson, ke tiu kritiko estus persona. Fakte, konante la verkojn de la unuaj du aŭ tri generacioj de spiritistoj, mi havis la impreson, ke la kvalito kaj rigoreco de tiuj tekstoj estis nekompareble pli altaj ol tiuj de la lastatempaj generacioj. Tiu persona impreso fariĝis certeco kiam mi lernis pri la ekzisto kaj funkciado de logikaj falacioj, ĉar mi tiam ekrimarkis grandan nombron da ili en la spiritisma diskurso de la lasta duonjarcento.

Mi ne eniros la historiajn aŭ kulturajn meritojn de tiu intelekta dekadenco, sed limigos min objektive al tio, kio povas esti detektata en tipa prelego aŭ norma teksto produktita de la nuntempa spiritisma kulturo.

La celo de ĉi tiu diagnozo estas antaŭenigi la bonon, la konadon kaj, finfine, la veron inter la komunumoj de spiritismaj praktikantoj, ĉar logikaj eraroj kiuj firmiĝas kiel akceptitaj kutimoj finfine senkreditigas la principojn, kiujn ni celas defendi.

Tiel do, mi limigas min ĉi tie al la studado de la plej oftaj logikaj eraroj en la spiritisma diskurso. Logikaj eraroj kaŭzas pli da miskomprenoj ol falsaj observoj – ĝenerale, bedaŭrinde, homoj ne faras zorgemajn observadojn de realo kaj ne bazas sur ili siajn opiniojn. Bonŝance por ni, grandaj pensuloj identigis la plej tipajn formojn de pensaj misoj, nomante ilin *falacioj*, kiuj do estas oftaj ŝablonoj aŭ tipoj de logikaj eraroj.

Por pure didaktikaj celoj, mi dividis la plej oftajn falaciojn en la spiritisma diskurso en tri klasojn: tiaj elementaj, kiuj konsistas el tre krudaj eraroj, facile eviteblaj per iom da atento kaj edukado; tiaj meznivelaj, ankoraŭ relative bazaj, sed kiuj aŭ pli oftas aŭ pli graviĝas laŭ la kresko de la kritika edukiteco de la preleganto; kaj tiaj sofistikaj, kiuj estas tiom subtilaj, ke ili estas preskaŭ neeviteblaj.

La elementaj falacioj estus tiuj, kiujn ni povas eviti per du simplaj rimedoj: memkritika edukado kaj *zorgo dum parolado*. Feliĉe, kritika kaj memkritika edukado estas fundamenta praktiko en la spiritisma kulturo kaj agado; sed, bedaŭrinde, la neprizorgo dum parolado estas la plej ofta malvirto en tiu sama grupo. Kutime, la bona preleganto estas tiu, kiu malplej zorgas pri sia parolmaniero, ĉar tiel li parolas pli "spontanee", kio estas perceptata kiel pli vera. Pro tiu sama kialo, la plej elementaj falacioj estas ĝuste tiuj, kiuj plej ofte aperas en la spiritisma diskurso kaj literaturo, dum la plej sofistikaj falacioj, ĝuste ĉar ili postulas pli grandan argumentan penadon, aperas malpli ofte.

En ideala situacio, la komunumo postulus argumentojn kiuj pravigu la asertojn kaj poziciojn de la parolantoj/verkistoj, kaj tia postulo devigus nin transiri el la

elementaj falacioj, kiuj spegulas mensan pigrecon, al la sofistikaj falacioj, kiuj spegulas subtilajn erarojn kadre de sincera provo argumenti.

La plej ĝena el la falacioj uzataj de spiritistoj estas nepre ankaŭ la plej ofta: la *falacio de apelacio al emocioj*. Per ĝi, la parolanto aŭ aŭtoro evitas klarigojn kaj argumentojn, alvokante la emociojn de la aŭskultanto aŭ leganto kun la celo impliki lin pasie favore al la dezirata konkludo. Preskaŭ kunfandiĝante kun bona parolarto kaj certigante al la parolanto la publikan preferon, la emocia apelacio subfosas la noblan, edukigan kaj moraligan celon de spirita instruado, ĉar ĝi anstataŭas la konvinkajn kaj klarigajn argumentojn per konstanta psikologia kooptado. Simple dirite, oni diras tion, kion la publiko plej deziras aŭdi, por tuŝi kaj alvoki la instinktan flankon anstataŭ la racian. Ĉi tiu rimedo ankaŭ manifestiĝas per la rakonta metodo anstataŭ la argumenta; tio estas, oni evitas laŭeble la uzon de logiko kaj klarajn klarigojn pri la kialoj de aferoj – ofte kritikante la logikon kaj raciecon kiel "malvarmajn" kaj eĉ danĝerajn, kio estas formo de kontraŭintelektismo –, preferante rakontadon de emociplenaj, ofte apelaciaj kazoj, por ke la publiko ne havu emociajn defendojn kontraŭ la diratajôj.

Certe, parolado pli bazita sur emocia inteligenteco povas esti mem logika, sen ke ĝia enhavo estu teda aŭ tro teknika, kondukante la aŭskultanton al vera senta altiĝo. Tiu rimedo estis abunde uzata de Jesuo, ekzemple, kiu teksis simbolajn aŭ verajn scenojn, poeziajn aŭ profetajn, tamen neniam frivole aŭ sen kohereco kaj racieco.

La dua plej ofta falacio en la spiritisma predikejo ŝajnas esti la *ipse dixit*, per kiu oni deklaras "tiel estas, ĉar tiel estas" aŭ "kompreneble estas tiel" – esence, la esprimo de pura kaj simpla dogmismo. Kiel tia, ĝi meritas malmulte da nia atento, ĉar la malracieco de aserto, kiu rifuzas pruvon per evidentaĵoj aŭ argumentoj, estas evidenta. Tamen, ĉi tiu estas eraro, kiun homoj faras senĉese, provante venki per insistado, kriado aŭ nura persona konvinko. La kuracilo kontraŭ naiva dogmemo estas memorigi, ke la serĉado de vero estas pli grava ol la dogma aserto de siaj kredoj kaj konvinkoj.

Dogmaj asertoj, sen akompano de pruvoj, povas ripetiĝi senĉese ĝis la publiko ilin akcepti pro aŭtomatismo. Tio estas la kazo de falacioj *ad nauseam*, en kiuj oni ripetas ion ĝis la aŭskultanto enuiĝi kaj, kun iom da bonŝanco, akcepti la aserton. Mi ne donos ekzemplojn de tio, kion mi opinias unu el la plej oftaj kaj lacigaj rimedoj de la parolado de preskaŭ ĉiuj, kiuj pretas publike paroli. Kiel observis Aristotelo en sia Retoriko, ĉiutaga diskurso venkas per laceco, kaj malmultaj estas tiuj, kiuj senpartie kaj strikte provas pravigi tion, kion ili asertas. Kune kun la pura kaj simpla dogmatismo de tia *ipse dixit*, ripetoj *ad nauseam* vere naŭzigas kaj ne faras paroladon pli konvinka.

Tre proksima al tiuj antaŭaj estas la falacio pri la *rajto je opinio*, per kiu parolanto rifuzas ajnan kontraŭargumenton, asertante ke li havas rajton je malsama opinio. Bedaŭrinde, tio estas ofta en spiritisma diskurso, kiam parolanto aldonas al senpruva aserto: "tio estas mia opinio", konsciante ke tiu supozata rajto metas sur malkonsentantojn negativan markon, kvazaŭ malkonsentantoj estus maljustaj, aŭtoritatemaj aŭ misuzemaj, kaj ne permesus rajton je opinio. Tamen, okazas ke seriozaj aferoj *neniam* estas decidataj surbaze de opinioj, kaj tiuj, kiuj uzas tiun

falacion, ne nur faras logikan eraron, sed ankaŭ moralan, malaltigante gravajn demandojn al kampo de prefero aŭ persona opinio, kio estas malprudenta.

Eble la plej diskutata falacio estas tia *ad hominem*, kiu malkvalifikas la personon por eviti alfronti la argumenton. Ni ofte trovas ĝin en spiritisma medio rilate al aliaj religioj kaj kredoj, kelkfoje ankaŭ rilate al politika sinteno kontraŭa al tiu de la parolanto, ekzemple, kiam sufiĉas diri, ke tiu aŭ alia persono estas katolika aŭ ŝamanisma, maldekstrula aŭ dekstrula, por malvalidigi lian parolon. Fakte, tia akuzo ne nur ne malvalidigas iun ajn diskurson, sed ĝi ankaŭ malkaŝas antaŭjuĝojn flanke de la parolanto. Aserti ke iu eraras nur pro liaj politikaj aŭ religiaj apartenoj tute ne ŝanĝas la meritojn de la argumentoj. Krome, estas speco de malkuraĝo akuzi kaj ataki la personon por fuĝi de la argumentoj, kiujn li prezentis.

Derivaĵo de la *ad hominem* estas la *motiva falacio*, kiu rifuzas konkludon nur surbaze de juĝo pri la motivoj de tiu, kiu ĝin prezentas. Ekzemple, la fakto ke iu profitas el ideo ne signifas nepre, ke la ideo estas malĝusta, aŭ ke la persono ĝin defendas *nur* ĉar li ricevas ian profiton per ĝi. Jes, estas vero ke tia motivo vekas suspektojn pri ebla distordo de la argumento, sed la argumento mem daŭre havas proprajn meritojn, sendepende de la motivoj de la parolanto.

La *ĝeneraligo tro hastema* estas ankaŭ unu el la plej konataj kaj diskutataj falacioj ekster la filozofiaj medioj. Ĝi okazas kiam la parolanto naive konkludas ion ĝeneralan surbaze de siaj propraj observoj. En la spiritisma medio, la uzo de tiu ĉi falacio kreskis dum la lastaj jardekoj, paralele al la tendenco al paroladoj pli opiniaj kaj bazitaj sur personaj perceptoj kaj spertoj, kaj ne sur seriozaj studoj. Fariĝis banalaĵo uzi esprimojn kiel “mi vidas tion ofte en mia konsultejo” aŭ “nuntempe oni rimarkas tion ĉe la gejunuloj”... Ĝenerale, la asertoj kiuj sekvas tiajn enkondukajn komentojn ne havas necesan rilaton al ĉiuj homoj, ĉiuj gejunuloj aŭ ĉiuj X, por ajna X. Ili estas observoj, kiuj spegulas kelkajn spertojn, ofte forte kondiĉitajn kaj partiajn, ĉar miaj pacientoj, miaj lernantoj aŭ miaj parencoj klare apartenas al specifa segmento de la homa socio, kaj eblas ke iliaj kondutoj similas simple ĉar ĉiuj apartenas al tiu sama tavolo de la realo, kiu estas multe pli kompleksa.

Supraĵaj interpretoj de komplikaj situacioj povas ankaŭ favori *konfirmajn partiecojn* rilate al antaŭkonceptitaj ideoj. El la fakto, ke la komunumo de spiritismaj praktikantoj rapide maljuniĝas, oni konkludas kun certeco, ke ekzistas nekapablo eduki kaj engaĝi pli junajn generaciojn. Sed la afero estas tiom kompleksa, ke ĝi povus impliki dekon da kaŭzoj, kaj estus malhoneste aŭ nemature agi tiel — kiel oni ofte vidas — indiki ununuran kaŭzon kiel klarigon de la fenomeno. Tre verŝajne, tiuj kiuj tion farus havos vidpunkton jam kondiĉigitan de iu prefero, limigita sperto aŭ antaŭjuĝo.

Eblas, ekzemple, ke kulturaj, ekonomiaj aŭ politikaj ŝanĝoj havas pli grandan influon sur la malintereso de gejunuloj pri spiritismaj agadoj ol la supozata malsukceso de antaŭaj generacioj en ilia formado kaj edukado. La ĝusta sinteno estus analizo kiu konsiderus ĉiujn faktorojn, kaj kiu humile inkluzivus eĉ la eblon, ke nekonataj faktoroj ludas rolon en tiu fenomeno.

Alia falacio, kiun oni aŭdas *ad nauseam*, estas tiu de la *pajlohomo*, per kiu la spiritisma parolanto malgrandigas, mokas aŭ malaltigas iun kontraŭulon, kun la celo eviti la bezonon respondi al liaj argumentoj.

La preferataj celoj de la falacio de la pajlohomo kutime estas la materialistoj, pri kiuj oni diras, ke ili estas egoistaj, ke ili ne havas sufiĉan spiritan evoluon kaj sekve estas erarantaj. Kvankam ĉi tiuj asertoj veras por iuj kazoj, ili certe ne adekvate priskribas ĉiujn kazojn, kiel tiujn de sciencistoj aŭ humanistoj, kiuj ankaŭ sekvas filozofian materialismon. Tiel, la ĝenerala malestimo de materialistoj kiel malbonaj, nesciaj aŭ senkonsciaj personoj fakte reflektas intelekte malhonestan supozon, ke ĉi tiuj homoj ne estus kvalifikitaj opinii pri spiritaj aferoj.

Kvankam ili povas okazi ankaŭ pro nescio aŭ naiveco, en bonintence, la malrekomendo kaj malaltigo de la oponanto estas inter la plej oftaj strategioj de *intelekta malhonesteco*, ĉar ili celas silentigi la kontraŭulon anstataŭ debati kun li pri polemikaj punktoj, kio povus ja krei malfacilaĵojn *por mi* mem. Ĝuste pro tiaj sintenoj Sokrato, fondinte la filozofion, ligis la metodan serĉadon de vero al morala sinteno, al honesteco en la esplorado kaj en la prezentado: tio estas, al enketado kiu pridubas miajn kredojn kaj antaŭjuĝojn same kiel tiujn de miaj kontraŭuloj. Tiu sinteno, konkludis Sokrato, estas ekstreme malfacile akirebla kaj subtenebla, ĉar la plej granda parto de la paroloj baziĝas sur antaŭjuĝoj, kredoj kaj personaj aŭ grupaj interesoj, kaj li nomis tion intelekta malhonesteco aŭ nepretiĝo al la serĉado de la vero. Tiel, laŭ Sokrato — aŭ Platono, aŭ Aristotelo — nia normala pensostato estus malhonesta, kaj la supreniro al la perfekta digno de la diskurso estas unu el la plej malfacilaj kaj altaj misioj de la homo sur la Tero. Sekve, kiel honesta debatanto, mi devas nuligi la falacion de la pajlohomo per la virto kontraŭa al ĝi: la karitata principo, tio estas, prezenti la argumenton de kontraŭulo en ĝia plej bona versio, kiel eble plej juste kaj komplete, kaj nur poste *eniri la debaton*. Eviti debaton estas ĉiam fuĝo el la racio, kaj la rekta vojo al mallumo kaj nescio.

Mi finas ĉi tie la liston de la plej elementaj falacioj, kvankam iuj logikistoj inkluzivas en tiu listo la du sekvajn, kiuj estos diskutataj: *argumentum ad ignorantiam* kaj *post hoc ergo propter hoc*. La kialo, kial mi ne inkluzivas ilin inter la plej oftaj elementaj falacioj en spiritisma diskurso rilatas al la impreso, ke ili ne estas tiel oftaj, kaj ke, almenaŭ parte, tio okazas ĉar ili ne estas tiel elementaj, spegulante pli grandan intelektan sofistikecon de la preleganto.

*Ad ignorantiam*, aŭ alvoko al nescio, estas la uzo de nescio kiel argumento. Dirite tiel, estus malfacile ke iu erarus tiel, sed, en la plej multaj kazoj, ĝi estas uzata bonintence por emfazi ke la kono havas limojn (kio estas vero kaj devus esti konsiderata en racia diskuto). Do, la komplekseco de ĉi tiu tipo de falacio kuŝas en la fakto ke bona edukado kondukas nin al pli zorgema observado de la limoj de la scio, kaj ke asertoj aŭ kredoj ne povas esti dogme kaj aŭtomate malakceptitaj nur pro manko de pruvoj. Fine, multaj el la kredoj de kiuj la socio dependas mankas je solidaj pruvoj. Tiel, la spiritisma ekspozicianto kiu emfazas ke "neniu povas pruvi ke Dio ne ekzistas", esprimas veron, sed, samtempe, malsukcesas racie diskuti la demandon pri la ekzisto de Dio. Ni disponas je pli ol sufiĉa literaturo traktanta la argumentojn kiuj sugestas la ekziston de Dio, por ke

la superforta plimulto de ekspoziciantoj insistu je falacio kiu nutras sin el la hontemo kaj manko de argumentoj fronte al ateismo kaj materialismo.

*Post hoc ergo propter hoc* (se io okazis post tio, ĝi estis kaŭzita de tio) estas tipo de falacio kiu ankaŭ postulas antaŭan sufiĉe racian rezonadon, ĉar ofte tio, kio antaŭas, vere anoncas aŭ kaŭzas tion, kio sekvas. Estas vere, ke la kaŭzo de iu evento antaŭas tiun eventon, sed multaj aliaj aferoj povas antaŭi eventon sen havi iun ajn rilaton kun ĝiaj kaŭzoj. Imagu klasĉambron, el kie oni aŭdas industrisirenon du minutojn antaŭ la paŭzo. La sireno estas aktivigita de la apuda fabriko, kaj ĝia celo estas reguligi la laborŝanĝojn de ĝiaj laboristoj. Tamen, lerneja infano povus imagi – malĝuste dedukti – ke la sireno estas agordita por anonci la manĝopaŭzon. Kvankam ekzistas forta korelacio inter la sireno kaj la horo de la lerneja paŭzo, kaj kvankam tiu korelacio estas fidinda, permesante al la lernantoj scii ke mankas du minutoj ĝis la paŭzo, ne ekzistas interna ligo inter la du eventoj, kaj, eĉ pli grave, ne ekzistas kaŭza rilato inter ili: la sireno nek produktas nek anoncas la lernejan paŭzon.

Ekzistas ankaŭ falacioj kiuj, pro sia subtileco, estas tre malfacile detekteblaj, kaj same malfacilas ke ni edukiĝu por eviti ilin. En la kazo de la jenaj pli rafinitaj falacioj, do, estas neverŝajne ke eĉ atento kaj bona preparo sufiĉos por ilin elimini.

La unua el la rafinitaj falacioj preskaŭ konfuzeblas kun retorika rimedo por deturni la atenton de la aŭskultanto al la signifo celata de la parolanto. Temas pri la falacio de emfazo, en kiu la konotacio direktas – kaj ofte misformas – la sencon de frazo dirita aŭ interpretita de la parolanto. Ekzemple, en la frazo "Moseo ricevis la ordonojn de Dio", la parolanto povas deturni la atenton de la publiko al la celata konotacio simple per emfazo de certa vorto. Se la parolanto diras "**Moseo** ricevis la ordonojn de Dio", li emfazas la gravecon de Moseo, aŭ sugestas ke nur li povus esti la protagonisto de tiu historia epizodo; se li diras "Moseo **ricevis** la ordonojn de Dio", li emfazas ke Moseo ne kreis aŭ koncipis la ordonojn, sed ricevis ilin tiaj, kiaj ili estas; se li diras "Moseo ricevis la **ordonojn** de Dio", li emfazas ke la profeto eble ne nepre meritis aliajn revelaciojn aŭ aliajn favorojn de Dio krom tiuj, kaj tiel plu.

*Amfibolio* estas bone konata inter spiritistoj, estinte rekte traktita de Kardek en la enkonduko de *La Libro de la Spiritoj*. Temas pri la fenomeno de konfuzo pri la signifo de vorto pro la diverseco de signifoj kiun la vorto mem enhavas. Kardek rimarkis, ke tio estas unu el la kialoj, kialj ni devus evoluigi novajn konceptojn kaj terminojn, evitante la uzon de aliaj jam tro ŝarĝitaj de ordinara lingvouzo aŭ de teologiaj signifoj. Ekzemple, en la frazo "Joĉjo renkontis Martan en ŝia domo", kies domo estas tio, de Joĉjo aŭ de Marta? La ambigueco okazas ĉar la vorto "ŝia" povus rilati al ambaŭ. Se mi diras "vi povas foriri, mi restos kun via sako", ĉu mi volas diri ke mi restos tie atendante vin, aŭ ke mi kunprenos la sakon kaj poste redonos ĝin? Ĝuste pro ĉi tiu kaŭzo, la spiritisma preleganto devas esti singarda pri la senpripensa uzo de vortoj kiel animo, ektoplasmo, mediumo, mediumeco, spirito, personeco, konscio, morto, perispirito, vivo, evoluo, feliĉo – kaj mi evitos plilongigi la liston *ad infinitum*.

La problemo de amfibolio estas la ambigueco, sed ekzistas kazoj en kiuj la ambigueco estas facile solvebla – kaj tiuj povas reflekti pli da ruzeco ol manko de atento. Tial, iuj preferas distingi de la amfibolio (fundamente semantika konfuzo

derivita el la naturo de la vorto) ĝian derivaĵon, la falacio de ambigueco, en kiu la konfuzo povus esti celita de la parolanto. En la homsciencaj fakoj de universitatoj, oni multe diskutas pri tio, kion Hegelo efektive intencis diri kiam li parolis pri la "fino de la historio". Ĉu li celis la finon kiel ĉeson, aŭ kiel celon? Ĉar la kompreno de ĉi tiu demando postulas plurajn jarojn da studado, malmultaj vere atingas la konkludon ke li parolis pri la celo. Tamen, la ŝajna signifo por ĉiu, kiu ne investis tiujn jarojn en la studado de idealismo, estas la malo: ke Hegelo parolas pri la konkludo aŭ fermo de la historio de la spirito. Kvankam la tre maloftaj specialistoj pri idealismo insistas pri la unua signifo, la superforta plimulto de interpretantoj indikas la duan, ĉar estas malkomforte agnoski ke tio, kio ŝajnas esti, ne estas.

Inter la plej akademiemaj prelegantoj, unu el la plej oftaj eraroj ne estas ligita al baza logiko, sed pli al pesimisma aŭ tragika mondrigardo, aŭ al drameca maniero esprimi sin. Tio estas la kazo de la falacio de la glitiga deklivo, kiu ricevas sian nomon de la intuicia ideo ke gliti sur deklivo neeviteble kondukas al tragedia akcidento. Ekzemple: "se maljunulo glitas sur tiu deklivo, li estas perdita" aŭ "se iu glitas de tie, li rompos la kruron, minimume".

Tiu ĉi falacio esprimas ioman pesimismon aŭ katastrofismon, sed la vero estas, ke ne eblas scii kiuj estos la ĝustaj konsekvencoj de la falo. Eblas ke nenio grava okazu kaj la persono simple releviĝu; eblas ke el cent homoj kiuj glitas, nur kvar suferu seriozajn akcidentojn, kaj naŭdek ses eliru sen vundoj.

Tamen, la falacio de la glitiga deklivo ludas kun niaj antaŭjuĝoj, biasoj kaj timoj, intensigante ilin. Ĉiutagaj ekzemploj de pesimismo aŭ paranojo estas frazoj kiel: "se tiu kandidato venkos la elekton, estos la fino de la mondo", aŭ "se oni liberigos kanabon, tio kondukos al aliaj drogoj, kaj ĉiuj fariĝos drogdependuloj". Kvankam estas vere, ke ekzistas tre malbonaj kandidatoj, kaj ke kanabo povas kaŭzi gravajn damaĝojn al mensa sano, ne estas neeviteble ke la mondo finiĝos pro elekto, aŭ ke ĉiuj ekuzos kanabon kiam ĝi estos leĝigita. Tiaj pensoj ignoras la kompleksecon de la implikitaj aferoj: ke lando estas pli ol la prezidento, aŭ eĉ ol la registaro; ke ne ĉiuj volas fumi kanabon; kaj ke ekzistas multaj kialoj por evoluigi drogdependecon, la leĝeco aŭ disponeblo de la substanco estante nur unu el ili.

Tio ne signifas, kompreneble, ke ni devus voĉdoni por tre malbona kandidato por prezidanto, aŭ ke estus etike subteni la leĝigon de substanco damaĝa por la cerbo. Sed la valideco de tiaj konkludoj ne pravigas la troigojn kaj la *formale* malĝustajn argumentadojn prezentitajn antaŭe.

Prelegantoj kiuj ŝatas citi sciencajn studojn ofte falas en la falaciojn de *falsa analogio* aŭ de *subpremado de evidenteco*. En la lasta, oni elektas la sciencajn evidentecojn favorajn al la konkludo de la parolanto, ignorante la studojn kiuj kontraŭdiras ĝin; en la unua, oni kreas falsajn analogiojn inter situacioj aŭ procezoj tute malsamaj. La plej ofta ekzemplo estas la tiel nomata kvantuma ŝarlatanismo, kiu infestas preskaŭ ĉiujn spiritismajn kaj ezoterajn mediojn de nia tempo. Surbaze de veraj procezoj de la naturo, priskribitaj de kvantuma mekaniko, oni kreas analogiojn kiuj etendiĝas de la resanigo de la korpo ĝis ŝanĝoj de personeco, sen ke estu ia ajn racia bazo por supozi, ke tiaj analogioj validas en la reala mondo.

Fine, io kio ofte eskapas al la novuloj en la studado de falacioj estas la fakto, ke fari logikajn erarojn ne signifas, ke la parolanto malpravas. Plej grave, tio ankaŭ ne signifas, ke la parolanto ĉiam malpravas, kvankam li eble eraras pri iuj aferoj aŭ formulis malĝustajn argumentojn. Ĉi tiu supozo ofte kondukas al la *alvoko al la falacio*, tio estas, la falacio de la falacio: konkludi ke, pro erara aŭ falacia argumento, la konkludo mem estas nevalida aŭ malvera. Estas tute eble, ke persono argumentu malbone, faru multajn erarojn, sed ke tio, kion li defendas, estu vera, morale bona, kaj tiel plu. Fakte, la kialo pro kiu ni restas spiritistoj malgraŭ aŭdinte tiom da nelogikaj kaj nevalidaj formuliĝoj estas tio, ke ni estas konvinkitaj ke, malgraŭ tiuj eraroj, tio, kion la prelegantoj defendas, estas vero aŭ proksima al la vero. Jen ankaŭ la kialo, kial ni estas morale indulgemaj al malbonaj prelegoj: ni estas konvinkitaj ke malantaŭ ili ekzistas bonaj intencoj, kiuj povas esti intuicie ĝustaj aŭ simple reprodukti tradicion de pli seriozaj studoj, kvankam la preleganto mem eble ne estas altnivela por la tasko.

# SPIRITISMO KAJ RELIGIO
# BONE KAJ MALBONE SUFERI



Jussara Korngold

**JUSSARA PRETTI KORNGOLD**


**BIO:**

Jussara Korngold estas Ĝenerala Sekretariino de la Internacia Spiritisma Konsilio, eksprezidanto kaj nuna vicprezidanto de la Usona Spiritisma Federacio. Fondinto kaj prezidanto de la Novjorka Spiritisma Grupo. Preleganto, verkisto kaj spiritisma tradukisto.

**TRADUKISTO:**

José Roberto Alves de Albuquerque

**REVIZIISTO:**

Givanildo Ramos Costa


**RESUMO:**

Bone kaj Malbone Sufere estas pripenso pri la rolo de doloro kaj sufero en la evolua vojaĝo de la homo. La teksto invitas al la kompreno, ke la sufero ne estas celo en si mem, sed edukilo, kiu povas transformiĝi en lumon kiam oni ĝin akceptas kun fido, pacienco kaj rezignacio. Ĝi montras kiel la interna sinteno antaŭ la provadoj — inter ribelo kaj akcepto — difinas ĉu ili fariĝas malliberejoj de amareco aŭ ŝtupoj al spirita leviĝo. Traktante la gravecon de harmoniigi pensojn kaj agojn kun la diaj leĝoj, la teksto inspiras serĉi internan trankvilon kaj vidi en la doloro la ŝancon veki la dia esenco dormanta en la koro.



**ŜLOSILVORTOJ:**

Bone kaj Malbone Sufere, doloro kaj sufero en la lumo de la Spiritismo, spirita evoluo, rezisteco, fido kaj akcepto.


Rilatante al iu fragmento de *La Evangelio laŭ Spiritismo*, Allan Kardec, ĉapitro 5, ni trovas en la ero 18 tekston de la Spirito Lacordaire pri "bone kaj malbone suferi". Li citas unu el la feliĉigaj diroj de Jesuo, "Feliĉaj la afliktitoj, la Ĉiela Regno apartenas al ili", klarigante, ke, por ke ni konkeru tiun feliĉigan pozicion, ne sufiĉas nur suferi, ni bezonas scii suferi. Ni bezonas, en la doloraj momentoj, defioj kaj elprovoj, elmontri nian veran fidon al Dio. Laŭ Lacordaire, la parolo de Jesuo "Feliĉaj la afliktitoj" povas do esti tiel tradukita: "Feliĉaj tiuj, kiuj havas okazon

elprovi sian fidon, firmecon, persistemon kaj submetiĝon al Dia volo, ĉar Ili havos centobligitan ĝojon mankantan al ili surtere, tial post la laboro venos la ripozo."

Sed kiel ni povas konkeri tiun fidon? Kiel ni povos, en momentoj de ekstrema malfacilaĵo, profiti la doloran elprovon, konvertante ĝin en lumvojon?

Nia tendenco ankoraŭ estas iĝi viktimo de la destino, kaj, tiel nature tia stato instaliĝas en ni, ke paradokse ni rezistas kaj eĉ sabotas nin mem, kiam oportunoj por pliboniĝo prezentiĝas al ni. Ni cedas al la pesimismo. Ne malmultas tiuj, kiuj, komentante pri siaj spertoj, diras al ni: "Ha, la vivo estas tia mem, la sufero estas ĝia parto."

Ĉu fakte estas por tio, ke Dio kreis nin?

Ni trovas en *La Libro de la Spiritoj*, en la ero 132, la sekvan demandon: "Kiu estas la celo de  enkarniĝo de la Spiritoj?" Tiuj respondas, ke esence ĉi tie ni reenkarniĝas por atingi la perfektecon, por kulpelpagi kaj plenumi iun mision. Ili aldonas, ke "la enkarniĝo ankaŭ havas alian celon: igi la Spiriton esti en tiaj kondiĉoj, ke li plenumu sian parton en la Dia verko. Por tiu plenumado li ekprenas, sur ĉiu planedo, veston konforman al la esenca materio de tiu planedo, cele sur ĝi plenumi, de tiu vidpunkto, la ordonojn de Dio. Tiel, samtempe kiam li kunhelpas por la ĝenerala verko, li mem perfektiĝas."

Laŭ la supra respondo ni konkludas, ke la ĉefa celo estas nobligi niajn spiritojn per travivaĵoj, kiuj kontribuos por ke ni, plej rapide, veku en ni la dian esencon.

Léon Denis al ni diras en la verko *La problemo de la estulo, la destino kaj la doloro*, ke "la doloro estos necesa dum la homo ne pensu kaj agu laŭ la eternaj leĝoj; ĝi ne plu ekzistos tuj kiam regos la harmonio. Ĉiuj niaj malbonaĵoj devenas de tio, ke ni agas en kontraŭa direkto al la dia fluo; se ni denove eniros tiun fluon, la doloro malaperos kune kun la kaŭzoj ĝin naskantaj." (Denis, jaro,)

Sed ni scias, kiel ankoraŭ estas malfacile por ni ekzisti en plena harmonio kun la dia leĝo. Tio, kion ni povas nuntempe fari, estas interna laboro por malgrandigi nian orgojlon kaj egoismon, por ke nia penso ne tiel deflankiĝu de la altaj idealoj.

Kiam la doloro vizitos nin, eblos al ni sekvi laŭ unu el tiuj du vojoj, tiu de la respondeco aŭ tiu de la ribelo. La respondeca vojo signifas konsciiĝi pri niaj agoj, komprenante, ke ĝi multfoje prezentiĝas por ke ni liberigu nin aŭ por ke ni sekvu laŭ la vojoj ankoraŭ pli dolorigaj. Ni prenu ekzemple la pozicion de la ŝafpaŝtisto, kiu, prizorgante siajn ŝafinojn, multfoje estas devigita uzi sian bastonon, por ke ili ne iru al la abismo aŭ aliaj danĝeraj vojoj. Tiel agas Dio kun ni, ĉar, prizorgante kun senfina amo ĉiun estulon de sia ŝafaro, Li permesas, ke situacioj de la vivo evitu, ke ni malsimpligu ankoraŭ pli nian vivvojaĝon.

Malfeliĉe multaj el ni elektas la duan vojon, kiu estas tiu de la ribelo. Ni konfliktas kun Dio kaj la mondo, ĉar ni ne akceptas, ke niaj provoj devenas de niaj agoj. Tiam la orgojlo ĉeestas kaj ni ekvojaĝas tra la ciklo de akcepto, starigita de la svisa psikiatrino Elizabeth **Kübler-Ross** (1926 – 2004), ankaŭ konata kiel la funebra ciklo. Ili estas la negacio, kiam ni ne akceptas, ke la fakto povas esti okazanta kun ni, la kolero, kiam  ni esprimas nian ribelon kaj malkredon, la ŝanĝo, kiam ni ekkomencas serion da negocoj kun ni kaj kun Dio, per malplenaj promesoj, la depresio, kiam ni notas, ke tiu ribelo estas senutila kaj ni poziciiĝas

kiel viktimoj de maljusteco kaj, finfine, la akceptado, kiam la leciono estas lernita kaj ni komprenas, ke ni devas trovi solvojn kaj iri antaŭen tra la faktoj de la vivo.

La rakonto pri la kverko kaj la du junkoj multe nin instruas rilate niajn sintenojn antaŭ la vivo: Grandega kverko estis elradikigita de la vento kaj forĵetita en rivereton. Ĝi falis apud kelkajn junkojn kaj demandis al ili: "Mi scivolas kiel vi, tiel malpezaj kaj malfortaj, ne estas tute dispremitaj de tiuj fortaj ventoj." Ili respondis: "Vi luktas kontraŭ la vento kaj konsekvence vi estas detruita, dum ni, kontraŭe, kliniĝas pro minimuma blovo, tiel, ni restas nerompitaj kaj ni postvivas."

Kiam ni travivas malfacilaĵojn, ni povas reagi kiel la kverko, luktante, plendante kaj petante Dion, ke Li formovu la baron de nia vivo, aŭ ni povas nin akomodi al ĝi, klinante kaj skuante kiel la junkoj, lasante Dion konduki nin tra la vento, tutajn kaj pli fortajn ol antaŭe.

Jen estas la diferenco inter alfronti, kontraŭstari kaj provi detrui la baron, kaj ĝin akcepti, kliniĝante antaŭ la cirkonstancoj de la vivo.

Budho alparolas nin, ke "la doloro estas deviga, la sufero estas opcio". Tial nepras scii suferi, eltirante la lumajn benojn ofertatajn de la doloro al la koro soifanta pacon.

La Spirito Cipriana, en la libro *En la Plej Granda Mondo*, ĉapitro 5, dialogante kun Spirito, kiu turmentas enkarniĝintan fraton, atentigas lin pri la fakto ke, kvankam li estis vera viktimo de alia, anstataŭ uzi la oportunon por kreski, li lasis sin regi de malamo. Ŝi diras, "la martiro estas didevena problemo. Provante ĝin solvi, povas la spirito altiĝi al la lumanta pinto aŭ fali en tenebran abismon; tial, ĉar multaj eltiras el la sufero la oleon de la pacienco, per kiu ili lumiĝas cele venki la proprajn mallumojn, dum aliaj el ĝi eltiras ŝtonojn kaj dornojn je ribelo, per kiuj ili sin ĵetas en la ombron de la krutaĵoj."

Ni estu fortanimaj, ni elprenu el la sufero la oleon de la pacienco, kaj ni komprenu, ke la maldolĉaĵoj de la vivo nur okazos dum nia animo troviĝos disonance kun la dia harmonio. Al ni diras Léon Denis, ke, "laŭ la animo altiĝas al pli vivanta klareco, por pli ampleksa vero, por pli perfekta saĝeco, la suferaj kaŭzoj mildiĝas, samtempe kiam malaperas la vanaj ambicioj, la materiaj deziroj. Kaj de staĝo al staĝo, de vivo al vivo, ĝi penetras en la grandan lumon kaj la grandan pacon, kie la malbono estas nekonata kaj nur regas la bono! La destino, pro tio, ke ĝi estas senlima, al ni ĉiam preparas novajn eblecojn por pliboniĝo. La sufero estas nur korektilo kontraŭ niaj misuzoj, niaj eraroj, instigo por nia marŝado. Tiel, la suverenaj leĝoj montriĝas perfekte justaj kaj bonaj; ili ne trudas al iu ajn senutilajn aŭ nemerititajn punojn." (Denis.)

Dio ĉiam akompanas nin je sia senfina amo. La bonfarantino Joanna de Angelis konfirmas la amon de la Patro en la malfacilaj momentoj de nia vivo, dirante, "la doloro estas beno sendita de Dio al Liaj elektitoj". (Kardec)

La elekto estas nia:
Ni povas travivi la amarecon kaj la galecon
Aŭ elekti la konekton kun la ĉielo

Ni povas elekti travivi veran inferon
Aŭ altiĝi per niaj emocioj al la eterno

Ni povas enfermigi nin ĉe la ĉeesto de la doloro
Aŭ malfermi niajn flugilojn elektante la amon

Kial elekti la suferon
Kiam ni povas renovigi la senton?

La krio eĥanta la malesperon
Povus fariĝi la laŭdo de la espero.

Ne vivu do en aflikto
Transdonu al Jesuo vian koron.

**Bibliografio:**


KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ la Spiritismo*. Braziljo: FEB.
KARDEC, Allan. 2006. *La Libro de la Spiritoj.* [Traduko de Evandro Noleto Bezerra]. Braziljo: FEB.
DENIS, Léon. *La problemo de la estulo, la destino kaj la doloro*.
XAVIER, Francisco C. (André Luiz, Spirito).. *En la Plej Granda Mondo*. Braziljo: FEB.

## FAMILIAJ PAROLADOJ DE TRANSTOMBO, HODIAU VI REVIDOS

*De la Spirito Nathanael*

Tiu rideto, kiu lumigis viajn tagojn;
Tiu rigardo, kiu kvietigis viajn sentojn per spiro de kompreno;
Tiu voĉo, kiu transformis momentojn en melodion, donante al vi pacon kaj esperon;
Tiu brakumo, kiu subtenis viajn paŝojn, instigante vin en tagoj de malvenko-lernado, kaj levinte vin en tagoj de venko super viaj defioj…

Ili ankoraŭ vivas!
Via amata, kiu antaŭiris vin post plenumi sian tempodaŭron de spertoj en la tera vesto, atendas vin trans la limo, fidante je via pacienco kaj kuraĝo.

Ili akompanas viajn paŝojn sen interrompi la necesajn spertojn por via spirita kaj morala kresko, sed restas proksime, inspirante vin por ke la lumo de espero neniam estingiĝu.

